

La signifo kaj valoro de liberpensado

Mi komencos per difino. Liberpensado povas esti difinita kiel la malakcepto de aŭtoritateco en aferoj de la opinio. Ĝi metas la persvadon de faktoj kontraŭ la devigo de perforto. Liberpensulo estas tiu kiu formas la propran opinion pro la faktoj kiel li konstatas ilin. Ĉu pravaj aŭ malpravaj, liaj opinioj estas la propraj Li estas voĉo, ne eho.

Historie, liberpensado fariĝis identa kun la malakcepto de religiaj doktrinoj. Ĉi tio okazis, ĉar de la flanko de la religio venis la impulso al maltoleremo. La homa socio naskiĝis en la ombro de religia timo, kaj en tiu stadio la subpremo de la herezado estis sankta socia devo. Poste venis la levigo de la pastraro, kaj la sendependa pensanto renkontis punon en ĉi tiu mondo kaj la minacon de eterna damniĝo postvive. Eĉ hodiaŭ ĝuste de la religia flanko venas la plej granda danĝero al libero de pensado. La religio estas la lasta afero, kiun la homo civilizos.

Konsiderinda progreso okazis en la antikva greka kaj roma civilizacioj rilate al la starigo de libero de pensado. Nek unu nek la alia havis ion ajn en la formo de sankta libro, kiu avertas la homojn ne manĝi de la arbo de scio, kaj aparte en Grekio ĉiu demando pri religio, etiko, scienco kaj filozofio estis diskutata kun la libero, kiun Eŭropo poste perdis kaj ne plene regajnis. Vere, se estus eble revivigi Atenanon de, ni diru, la tempo de Sokrato kaj meti lin en la centro de Eŭropo je kiu ajn dato de la kvina ĝis la dekseka jarcentoj, kaj se li estus vidinta la karceron, la punfoston kaj la torturĉambron funkciantajn por malebligi kritikojn de la religio, li estus pensinta, ke la mondo subite suferegas de epidemio de frenezeco.

La intelekta libero de Eŭropo mortis kun la starigo de la Kristana Eklezio. Biblio en la mano, la eklezio renkontis ĉiun novan ideon kun „Tiel diras la Sinjoro”. Sur la ruinoj de la antikva civilizacio ĝi metis la standardon de motivita dogmismo kaj malfermis unu el la plej malbeleĝaj ĉapitroj en la historio de la homaro. Esploro estis malpermesita, libero de parolo estis tabuita, premio proponiĝis por malkuraĝo kaj hipokriteco, oni metis imposton sur intelektan sincerecon. Maltoleremo fariĝis virto kaj persekuto, kutimo.

Nenio pli demoraliga iam ekzistis. Koncerne la religian herezon, neniu homo povis senti sin ekster danĝero. En la nomo de la religio homo instruiĝis denunci sian najbaron, edzino sian edzinon, infano sian patr(in)on. La eklezio iris eĉ plie kaj igis homon policano super si mem, ĝis la homoj timis pensi, pro timo, ke ili kondukigos en la dubadon. La pensanto ĉie suspektiĝis. La kredema stultulo estis aprobita kiel modelo de religia perfekteco. Ĝi estis la plej abomena sistemo, kiun la mondo iam konis.

Per la malpermeso de la libera interŝanĝo de ideoj la eklezio atencis la bazon de la progreso. Tra la tuta animala naturo la variado estas unu el la kondiĉoj de la evoluo. La kontraŭa procedo estas la eliminado, per kiu malfavoraj aŭ maldezirindaj

variaĵoj estas elsarkitaj. La eklezio alprenis la lastan procedon. Ĉiu variaĵo kontraŭ la idearo estis subpremita. Ĝi altrudis konformigon sur ĉiun kun la rezulto, ke stagnado stariĝas — eĉ io pli malbona. Safsimila sinteno estis enplantita, kaj kie la homoj dresiĝas kiel ŝafoj, ili partoprenas la sorton de ŝafoj — ili estas tonditaj kaj manĝitaj.

Se juĝistaro de episkopoj estus ekzistinta inter niaj simiaj prapatroj, la homa raso ne aperus. La unuaj variaĵoj direkte al pli homa speco estus subpremitaj kiel blasfema novaĵo.

En la historio de ĉiu institucio venas tempo, kiam ĝi devas fronti al la defio de nova scio. La homo, kiu faras ĉi tiun defion, estas posedado de granda socia valoro. Li pelas nin al io, kio similas mensan inventadon, por formeti neuzablajn variaĵojn kaj por reproviziĝi laŭ pli prudentaj linioj. La plej granda bezono nunepoke estas krei medion, kiu estas entute gastigema al novaj ideoj.

La voĉdonrajto etendas la politikan potencon trans vasta areo, sed portas nenian garantiaĵon pri ĝia ĝusta uzo. Ĉiuj povas legi, sed legado sen la kutimo de kritiko estas preskaŭ senvalora. La gazetaro eljettas sian fulmon kaj la popolamasoj estas sen kondukilo, kiu protektas ilin kontraŭ ĝiaj danĝeroj. Neniam estis epoko, kiam ekzistis pli granda bezono por sendependa pensado ol troviĝas nunepoke. Bedaŭrinde dekkvin jarcentoj de la kristana regado ĝeneraligis maltoleremon de neortodoksaj opinioj pereige.

En la kristana mitologio estas rimarkite, ke la unua homa peko estas ago de malobeo. Li manĝis de la Arbo de Scio, kaj la Dioj ne povas pardoni tiun ofendon: tamen, la scio estas la plej granda bezono de la homaro. Ĝuste tio levis lin de la sovaĝeco al la civilizo. Ĝuste tio igas lin pli ol egalulo de la Dioj. Ĝi levas lin super ilin. Sed oni ne povas akiri malfalsan scion, sen la kuraĝo ekzameni, modifi kaj forĵeti tion, kio jam establiĝis. Ĉi tio estas doloriga kaj ĝena procedo; kaj la doloro estas tiu de nova naskiĝo, la ĝeno estas tiu de la forviŝado de aferoj, kiuj pretervivis sian utilecon. La Liberpensado, do, pretendas al la kiel eble plej plena libereco de pensado, parolado, publikigo kaj agado. Ĝi postulas ĉi tiujn ne kiel luksaĵojn, sed kiel necesajn; ĝi petas ne nur por ilia toleriĝo, sed por ilia kuraĝiĝo. Ili devas esti la senkondiĉaj kaj neforigeblaj rajtoj en socio, en kiu viroj kaj virinoj povas ekzisti kun digno kaj memrespekto.

Chapman Cohen, en 1932.

Tradukis (el la angla) VERDIRO.

Henr. Roland-Holst:

ROZA LUKSEMBURG

SIA VIVO - SIA VERKO

En traduko de Bas Wels.

236 paĝoj. Bindita. Prezo: dol. 1.50
Biografio pri unu el la plej noblaj
virinaj figuroj de l' porsocialisma
movado.

SAT-eldono.

Faktoj kaj komentoj

Politikaj aspektoj en Usono

Makarti (Mac Carthy) nun kolektas la lunatikulojn de la politika dekstro k la influo serioze malgrandiĝas. Li ne plu estras la faman komisionon de enketo pri politika pensado, kaj Ajzenhauer k la estroj de la respublika partio rezignas uzi lin en atako kontraŭ la demokrata partio, kiu venkis en la novembra ĝenerala voĉdono. Kompreneble li restas senatano k kredeble estos centro de la plej reakciaj elementoj, kiuj parolas pri nova tria politika partio pere de sia Asocio „Por Usono”.

La Amerika Federacio de Laboro k C.I.O. (Industria Sindikataro) nun grave diskutas pri unuiĝo k tio estas pli atendebla ol en periodo antaŭa. Komenciĝas agitado por garantii salajron tutjaron, do por 52 semajnoj, k plialtigi la minimumon laŭlegan de 75 cendoj hore ĝis dol. 1,25, k Ajzenhauer jam promesis 90 cendojn. Li ankaŭ en oficiala deklaro promesis multajn aliajn reformojn. 488

Pri la libroj en usonaj universitatoj

Antaŭ du cent jaroj fondiĝis Kolumbia Universitato en Novjorko, kies studentaro nombras nuntempe 22 mil. Dum 1954 tiu universitato invitis eminentulojn ĉiulandajn por publike diskuti la temon „Rajto de homo je scio k libera utiligo ĝia”. La delegito el Moskvo estis eminenta arkeologo, profesoro Boris Ribakov. Post sia vizito li protestis, ĉar li en la universitata librerio ne trovis la verkojn de sovetiaj aŭtoroj. Sed prof. G. T. Robinson indigne raportis, ke li mem montris al sia kolego Ribakov ekzempleron de la verkoj de Ribakov mem, kiam li persone kondukis lin tra la fakoj de la universitato. „Estas centoj da libroj verkitaj de sovetiaj aŭtoroj en nia librerio k kompletaj kolektoj de la verkoj de Stalin k Lenin”, asertis prof. Robinson.

Ankaŭ prof. Ribakov kritikis (laŭ „Vespera Moskvo” en kiu li priskribis sian viziton), ke studentoj de Kolumbia Universitato devas akiri vivrimedojn per laboro kiel kelneroj, ktp. Fakte 60% el la studentoj ricevas financan subtenon per stipendio, monprunto aŭ per part-tempa laboro. Ofte en Usono filo de riĉulo tiel laboras, dum li partoprenas kursojn. 488

Financistoj regas

Verdiro en „The Socialist Leader” de l' 29. jan. membras pri la nekontestebla regado de l' „Fera Kalkanumo”, t.e. la plutokrata oligarkio, kies agadojn tiel lerte priskribis Jack London en sia supratitola verko*). Li trovis novan elmontron de tio okaze de la ĵusa fervojista striko en Britio, kiu minacis pro la nesufiĉaj salajroj de tiu kategorio de laboristoj. Por eviti tiun strikon, esplorkomisiono starigis, kiu konkludis, ke, ĉar la fervojoj estas ŝtatigitaj, la ŝtato (t.e. do la civitanaro!) devas zorgi, ke ili funkcii bonorde (kio estas ebla nur, se ĝiaj servantoj ricevas sufiĉan salajron). Tio implicas, ke la loĝantaro devas pagi la pliajn kostojn, per impostoj, prezoj plialtigataj, ktp. Jen la simpla solvo proponita! Por ĵuste pagi al unu kategorio, la tuta popolo devas suferi.

Verdiro kiel socikreditano (kaj tiel ankaŭ rezonas la Abundanoj en Francio k la Belamianoj en Nederlando, k.a.) rimarkigas, ke en nova socio sen monmonopolo oni facile povus pagi ĵustajn ĝustajn salajrojn al ĉiuj laboristoj sen altigo de la prezoj de la varoj k servoj k samtempe kun tuta nuligo de la impostoj.

*) „La Fera Kalkanumo”, tradukita de G. Savil, estas ankoraŭ havebla ĉe SAT. - 368 p. - Prezo 0.80 dol. plus sendkosto.

Nia Poŝto

26.893. — Via artikolo taŭgas por esti prezentata al varbotoj, sed ne al praktikantaj esperimentistoj, kiaj la legantoj de „S-ulo”.